

# Sennaciulo

NIA DOSIERO

VIVO DE  
LA  
HOMOJ...  
paĝo 4



"Foto: asocio de demokrataj seklaboristoj"



Sennaciulo, januaro 2007, n° 1 (1219), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442 prezo 5 €

21-28a de Julio 2007

Tutmonda solidareco

80-a SAT-Kongreso

ANTONY - Residence Jean ZAY

ANTONIO - Restadejo Johano Zajo



# NIA DOSIERO

## AL NIAJ LEGANTOJ

Kiel vi povas konstati, la nova Redakta komitato decidis en ĉiu numero prezenti dosieron pri iu aktuala temo. Kadre de la temo "Vivo de la homoj" ni prezentas en tiu ĉi numero artikolojn pri la seksmerkato kaj ekspluatado, mistraktado de la virinoj. Ĉi apude vi vidas bildon kiu enkondukas tiun ĉi temon, speciale la artikolon "Ĉu leĝigi la prostituadon?" Esperante ke tiu iniciato plaĉos al vi, ni deziras al ĉiuj agrablan legadon.

La Redakta komitato



**Antaŭ leĝigo...**



# Sennaciulo

## OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: 09.50.71.01.97. Retadreso: satesperanto@free.fr. TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org> Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la labor-horoj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.  
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39  
BIC: PSSTFRPPPAR  
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - Cyril Orsingher, Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Jacques Bannier, Vinko Markov kaj Vito Markov.  
Ĉefredaktoro : Cyril Orsingher  
Enpaĝigisto: Krešimir Barković  
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.  
Aperas monate - Mensuel.  
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER  
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.  
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépôt légal à la date de parution.  
N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuajtoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



# AL NIAJ LEGANTOJ

## Komuniko de la Plenumkomitato

Ekde januaro 2007, la plenumkomitato komisias la redaktadon de la oficiala organo de SAT al pliampleksigita skipo, kiu konsistas el la malnovaj skipanoj, al kiuj aldoniĝis pliaj laborpretaj kamaradoj, kies nomojn vi legos en la kolofono. La labormaniero estos reorganizita, prikonsiderante la novajn (precipe retajn) tehnikajn eblojn, kiuj aperis lastatempe, sed tio ne signifas, ke kamaradoj sen retaliro devas sin senti ekskluditaj el la laboro. Ĉiaj kontribuajtoj kaj helpopropoj

kompreneble restos bonvenaj. Estu ankaŭ klare al ĉiuj, ke tiu ŝanĝo ne estas kaŭzita de imagita nekompetenteco de la ĝisnuna skipo, kies membroj plejparte plu kontribuos, eĉ se okazis nova taskodispartigo.

La PK deziras sukceson al la pliampleksigita skipo kaj vokas ĉiujn membrojn al vigla kunlaborado.

En Parizo, la 5-an de decembro, La Plenumkomitato de SAT

## REZULTATO DE REFERENDUMO 2006

Konforme al la statuto, fine de la jaro 2006 okazis Referendumo pri la kreo de "Kooperativa eldonfako de SAT".

La 14-an de januaro 2007, en la SAT sidejo, okazis kribrado de ricevitaj voĉdoniloj kiun faris Barbara PETIT kaj Vito MARKOV. Jen la rezulto :

POR : 106  
KONTRAŬ : 8  
SINDETENO : 18

Entute 132 voĉdonintoj.

Per tiu referendumo la kreo de "Kooperativa eldonfako de SAT" estas aprobita.

## BALDAŬAJ LEA-KONGRESOJ

La 62-a kongreso de SAT-Amikaro (franclingvia LEA) okazos de la 7-a ĝis la 10-a de aprilo 2007 apud Bordojo. Informoj kaj aliĝkondiĉoj haveblas ĉe la OKK :

Esperanto-Gironde, ĉe Joël LAJUS, Les Places, FR-33910 SABLONS, tel: +33(0)557 692 696; retadreso: [satamikarokongreso2007@orange.fr](mailto:satamikarokongreso2007@orange.fr)

La unua kongreso de Arci-Esperanto (itala LEA) okazos en Milano inter la 27-a kaj 29-a de aprilo 2007.

Ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe: Andrea Montagner, via Mambretti 29, IT-20157 Milano, retadreso : [andrea.montagner@arciesperanto.it](mailto:andrea.montagner@arciesperanto.it) aŭ rekte en la kongresa retejo: <http://www.arciesperanto.it/html/kongreso/>



## VIVO DE LA HOMOJ

### Fragmentoj pri la sekso-laborista movado

**Ĝis nun seksaj laboristoj en Koreio kuŝas en nenormala eksterleĝa kondiĉo. Oni nomas ilin 'prostituitinoj'.**

'Specifa leĝo de seks-negoco', publikigita en 2004, faras tiun ĉi kondiĉon por ili ankoraŭ pli malbona. Ĉar la leĝo krimigis kaj punis ĉiun seks-negocon. Kvankam poste, pro la kontraŭstaro de seksaj laboristoj, povis nuliĝi punado, ilia malbona kondiĉo ne boniĝis, pli ĝuste plimalboniĝis. Ĉar registaro ekigis malkonstruadon de 'vilaĝo de prostituitinoj'. Sed gravaj aferoj progresis dum tiu tempo.

#### Kunsido de seks-laboristoj

Ĝi estas, ke la mem-organizaĵo de seksaj laboristoj kontraŭ la sufoka politiko ankaŭ progresis. Ĝi nomiĝas 'Asocio de demokrataj seksaj laboristoj'. Ĝi kontraŭstaras malkonstruadon de 'vilaĝo de prostituitinoj', kaj strebas akiri laborrajtojn por seksaj laboristoj.

Ĉirkaŭ tiu ĉi problemo, mi volas noti kelkajn pensojn kiel memorlibreton.

1. Mi kontraŭas 'specifan leĝon de seks-negoco'. Ĉar la leĝo sufokas liberecon de seks-laboristoj, seks-etindustriistoj, kaj aliaj homoj. Mi komprenas la leĝon kiel kvazaŭan virtualan novliberalisman leĝon. Ĉar dum lasta tempo, seksa negoco ne reduktiĝis, pli ĝuste pligrandiĝis. Ĝi nur estas aliformigita. Seksa negoco disvastiĝis de 'vilaĝo de prostituitinoj' al ĉiuj sociaj surfacoj. Do ni povas kompreni la politikon de malkonstruado de vilaĝo de prostituitinoj kiel kvazaŭan novliberalismigon de seksa industrio. Rezulte, nun fraŭlino, universitatano, eĉ studentino ktp ekas egaliĝi en seksa laboro.

2. Do, kio faras kaj puŝas la seks-negocon malleĝa kaj malhoma? Eble diversaj kaŭzoj funkciigas unu la alian. Sed mi pensas, ke grava kaŭzo estas nuna normala 'familia leĝo' kaj la sistemo

de patriarka monogamio. Nuntempa patriarka monogamio estas praktike poligamio. Tio estas, ĝi havas gravan kontraŭdiron. Por ke poligamio subtenu monogamian karakteron, eksteredzineco-rilato devas esti nenormala kaj malleĝa kaj mortema. Tiu ĉi sinteno estas kompreneble konservema. Ke en korea 'Fako de fraŭlino-familio', kiun



Fotis: "asocio de demokrataj sekslaboristoj"

gvidas majoritata feministan grupon, la malleĝigo de seksvendo ĝis nun estas ekstreme natura (sed reakcia!) en tiu ĉi punkto. Jen ni devas ne forgesi, ke seksaj laboristoj estas dividataj inter prostituitinoj kaj edzinoj. Kontraŭstarigo inter prostituitino kaj edzino estas metodo por subteni patriarkan sistemon. De ĉi tiu originas la neceseco de unuiĝo de prostituitino kaj edzino kiel homo. Denove, unuiĝo por kio? Por homarismo...komuniĝo de homaro.

3. Ni ankaŭ devas esplori alian fundan aspekton. Malriĉeco! Ĝis nun seksan laborpovon provizas precipe malriĉaj virinoj. Specife ekstermem-pova ŝuldo estas la kondiĉo de seksa vendo. Kvankam seksa vendo havas ĉi tiun specifan karakteron, vendo de laborpovo estas la universala fatalo de ĉiuj malriĉaj homoj. Tial, la postulo de seksaj laboristoj 'rekonu seks-vendon kiel seks-laboron' estas justa. Asocio de seksaj laboristoj estas parto de asocio de proletoj. Sed iliaj nunaj postuloj ne transpasas kapitalistan liberecon. La postulon 'rekonu seks-vendon kiel

sekslaboron' povas ĉiam uzi kapitalista seksindustrio. Alivorte la postulon povas uzi kiel moton seksindustrio. La strebo por pli bona vivo estas grava. Akiri la pozicion de salajrata laboristo povas kontribui al pli bona vivo de 'prostituitinoj'. Do, kiel estas la abolo de salajrata sekslaboro parto de abolo de universala salajrolaboro? Ni nepre ne devas konfuzi 'la malpermeson de prostituado' kun 'la abolo de salajrata seksa laboro'!! Antaŭaĵo estas morala kaj konservativa, kaj sekvantaĵo estas etika kaj revolucia. Mi pensas ke nun ŝanĝo de prostituitino al leĝa seks-laboristo estas necesa. Ĉar ĝi estas postulo de prostituitino mem kaj kondiĉo de unuiĝo de laboro. Sed revolucio ne bezonas la etapan ŝanĝiĝon. Ĉar prostituitino estas jam proleto, kaj havas la potencon batali por komunismo. Historio montras ĉi tion ripetfoje.

Demokrataj seks-laboristoj kritikis femalan organizon.

4. Ne nur prostituado sed ankaŭ geedzeco devigiĝas en virino (kaj viro iasence!). Ĝi estas alia formo de dungiĝo. Dungiĝo okazas pro malriĉo. Tradicia kapitalismo uzas prostituitinon kaj edzinon kiel seks-sklavinon por konsoli viran ekspluataton. (Kompreneble estas multe da aliaj kialoj, ekzemple, produktado de laborpovo ktp.) Se la strukturo de industrio ŝanĝiĝus en la direkto bezoni la virinon, la seks-roloj povus interŝanĝiĝi. Ekzemple virina seks-laboristo povus bezoni aliajn virajn aŭ virinajn seks-laboristojn por si. Ĉi tio montras al ni, ke la abolo de kapitalismo kaj la abolo de seks-antagonismo estas unua tasko.

5. Pri la senkondiĉa garantiata enspezo mi volas pripensi poste.

Amelano (Koreio)  
amelano@amelano.net

Hejmpaĝo de 'Asocio de demokrataj seksaj laboristoj' <http://cafe.daum.net/gksdudus>

## NIA DOSIERO

### Ĉu leĝigi prostituadon ?

La artikolo de Amelano bone priskribas ĝeneralan tendencon, en la medio de defendantoj de prostituitinaj rajtoj, pledi por leĝigo de io, kion ĝenerale ĉiuj konsideras malaperinda.

Fakte samaj debatoj okazas nun en Francio, kie kelkaj asocioj pledas por

kaprico. Kaj, se kredi la atestojn, multaj senskrupule uzas tiun naŭzan eblecon.

Alia praktika rezulto de tiu eksterleĝeco estas, ke persekutitaj estas ĝenerale nek la klientoj, nek la makleristoj, sed la prostituitinoj mem. Krome, tio malhelpas la eventualan reintegrigon de prostituitinoj, kiuj emas reguligi sian situacion, kaj ne kapablas pravigi la de-

vas esti konsiderata kiel necesa ŝtupo por atingi ĝian iaman forigon.

Tamen, malgraŭ ĉiuj tiuj argumentoj, la batalo por leĝigo havas tre ĝenajn aspektojn. Unu el ili estas la prezentado de vendado de fizikaj servoj kiel socia progreso, eĉ kun emancipaj ecoj. Mi foje rekte aŭdis membron de asocio pri sanprotektado de prostituitinoj kiu, surbaze de siaj ĉiutagaj kontaktoj kun tiu medio asertis, ke prostituado estas unu el la plej bonaj manieroj emancipiĝi el la vira patriarka subpremo, kaj ke prostituitinoj tute libervole elektas sian profesion.

Pri tio mi havas fortajn dubojn. Laŭ la cititaj ekzemploj, montriĝas ke multaj prostituitinoj taksas tiun profesion nur « provizora fazo » en sia vivo, kaj uzas ĝin por rapide akiri kapitalon, kiu ebligas al ili malfermi butiketon kaj « honeste » labori kiel etkomercistoj. Mi tute ne vidas revolucieron en tiuj etburĝaj kalkuloj.

Kaj la ŝajnmateriisma argumento, laŭ kiu ne estus pli ŝoke vendi fizikajn servojn ol sian laborforton, estas akceptebla nur por tiuj, kiuj taksas normala la klasan dividon de la socio inter ekspluatistoj kaj ekspluatitoj.

La nura eksprostituitino, kiun mi aŭdis rekte esprimiĝi pri la temo tute senambigue parolis pri sklaveco koncerne sian iaman situacion. Tio sufiĉis por firmigi mian konvinkon, ke batali por apartaj rajtoj de iu homgrupo sen prikonsideri la ĝeneralan problemon, kiun starigas la kapitalisma sistemo entute, kondukas al senelirejoj. Tio ankaŭ plifortigas mian dubon, pri la ofte uzita argumento pri « neceso respekti la rajton je memdecido », kiun iuj emas uzi subtene al etnoliberegaj bataloj.

Vinko Markov



### Post leĝigo...

laŭleĝigo laŭ la modelo de Germanio aŭ Nederlando, kaj eĉ serioze parolas pri eventuala kreo de specialaj lernejoj.

La problemo estas malsimpla, ĉar la nuna situacio efektive estas nekontentiga. Same kiel por ĉiuj neleĝaj laboristoj, la statuso de la prostituitinoj metas ilin en situacion, kie ili malfacile povas plendi ĉe policejo pri spertitaj problemoj, ĉar deklaro de ilia « profesia situacio » metus ilin en grandan embarason, ĉefe kiam krome temas pri eksterleĝaj enmigrintoj. Praktika konsekvenco de tio estas, ke makleristoj kaj policistoj havas plenan trankvilon por misuzi sian situacion por maksimume ekspluati, priŝteli aŭ perforti prostituitinojn laŭ sia

venon de la mono, pri kiu ili disponas.

Alia paradoksa punkto en Francio estas, ke kvankam eksterleĝaj, prostituitinoj estas devigataj pagi impostojn pri siaj enspezoj, kaj eĉ estas severe kontrolitaj, kaj monpunitaj okaze de « falsa deklaro ». La kontrolo ĝenerale konsistas en nombrado de la tagaj klientaj vizitoj, kaj multobligo de la konstatita nombro laŭ labortagoj en la monato, kvankam la klientaj vizitoj tute ne okazas laŭ regula ritmo en kelkaj kazoj.

Fine, el principa vidpunkto, same kiel sindikatoj postulas salajroplialtiĝojn anstataŭ abolon de la salajreco, la batalo por leĝigo de prostituado po-



## Ideologio de la vira tiraneco

“Inoj, vi tenas en viaj manoj la savon de la mondo.” L. Tolstoj

**Ĉu virino estas perfekta, delikata, fragila kreaĵo naturdotita por la graco kaj allogeco ?**

Ĉu vere tiu estaĵo kiu fascinas la poetojn indas kulton? Ĉu ŝi male estas nature perfidema, malsupra, malforta, malracia pekulino? Ĉu niaj antaŭjuĝoj, bonaj aŭ ne, kaŝas realan nescion kaj



absolutan, kruelan frenezon, ian anarkion de la deziroj kiuj perfidus nian spiriton? Ĉar la moralaj aŭ la sciencaj antaŭjuĝoj, kiuj ofte estas la avataroj de la unuaj, estas ekstreme potencaj majstroj de mondo kie la viroj ankoraŭ tro ofte perfortas, subpremas, apartigas, murdas, malhonorigas la virinojn. Ĉu la viro ĉiam restos sur la ŝnuro inter lia ina idealo kaj lia malestimo de la alia sekso? Egaleco eble signifas : Resti sur la ŝnuro. Kompreneble, mi ne havas respondojn sed oni interesiĝos en tiu artikolo pri kelkaj el la plej gravaj mensogoj kiuj de jarmiloj ĝis nun malliberigas la virinojn kaj blindigas la virojn.

### La sago kaj la kruĉo.

Evoluo de la homa socio, prahistorio de la vira tiraneco.

Kio okazis por ke la homaj socioj fariĝas lokoj kie aperas tiaj diferencoj

inter la homoj ? Kiuj individuoj sukcesis tiagrade enskribi leĝojn, morojn, kredojn, timegojn en la spirito kaj la karno de la popoloj ? Kiel kaj kial, tre ofte, virino perdas memestimon eĉ inter la brakoj de sia edzo kaj rezigne akceptas similan destinton por sia filino ? Kio reale estas kaj kion signifas “la kondiĉo de la virino” ?

Laŭ la paleoantropologo Pascal Picq (Paskal Pik) la rolo kaj la loko de la virino subite evoluis en la unuaj agrikulturaj socioj dum la neolitiko. Ja, dum tiu periodo la homoj specialigas sin kaj pli grave dividas la taskojn inter la homoj. Tiel la viro kaj la virinoj ne plu plenumas samajn taskojn. Aperas diversaj kasto kiel, la plej okulfrapa, la kasto de la batalantoj kaj/ aŭ ĉasistoj. Samtempe, ŝajnas ke oni starigis leĝojn kaj tabuojn pri, ekzemple, la sango, la viando kaj la menstruo. La etnografio, ĉiam laŭ P. Picq, tamen montras ekzemplojn de socioj en kiuj virinoj aktive partoprenas al la ĉaso. Li ankoraŭ klarigas ke la prahistoria arto elmontras ke, antaŭ tiu epoko, viro kaj virino ĝuis socialan kaj simolan tempon por krei, fabriki kaj evoluigi la ilojn. Do, la masklo kiu inventas ĉiujn teknikojn kaj malkovras la fajron certe estas mito. Estas strange ke ankaŭ dum la neolitiko la amasmurdoj, la “ŝtataj” perfortoj aperas ! La mediteranea regiono ŝajnas esti la unua parto de la mondo kie la vira tiraneco iĝas absoluta : kontrolado de la sekseco, kulto de la virgineco, honorkrimoj, incestoj (por konservi la reĝolandojn) , unika Dio vira, ...

Oni iom pli bone komprenas kiel enradikiĝas la potenco de la viroj kaj, eble, kial oni inventis virinon kiu ĉu estas objekto ĉu idealo sed neniam ... persono.

### Anatomio de la moralo. La sciencaj antaŭjuĝoj.

Por pravigi la perforton kontraŭ la virinoj kaj daŭre establi la regpotencon de la viroj, oni pli kaj pli uzis sciencajn antaŭjuĝojn. Oni serĉis “naturajn” kialojn por elmontri la diferencojn de

ambaŭ seksoj. Laŭ iuj scienculoj la genoj, la pezo de la cerbo, la hormonoj, ekzemple, estas neŭtralaj kaj objektivaj respondoj. En okcidento, iu naturalista ideologio ludis gravan rolon por persistigi la malaltan rangon de la virino en la tiamaj socioj kaj ankoraŭ nun. Oni deturnas, simpligas la sciencajn argumentojn por konvinki nin ke la virina kondiĉo neniam ŝanĝiĝos. Ĝuste,



“virina kondiĉo” signifas tion : natura stato kiu ne povas ŝanĝiĝi kaj malebligas ĉiujn ribelojn aŭ plian pripenson. Ekzemple, ekde la 18-a jarcento anatomiistoj proponis bildojn de la homa korpo en kiuj la skeleto reprezentas la nekontesteblan superecon de la viro. Tamen la aktualaj sciencoj montras ke la dimensioj de la skeleto multe ŝanĝiĝis laŭ la epokoj, la regionoj kaj individuoj de ambaŭ seksoj kaj ne povas pruvi ajnan superecon de unu el ambaŭ seksoj. Oni ankaŭ ofte diris ke la vira cerbo estas pli peza, dika,... La realeco estas tre diferenca ĉar la cerbo evoluas danke al la natura, socia, familia medio ! 90% de la konektoj de la cerbo estas konstruitaj post la naskiĝo kaj tio precipe dependas de la medio kie troviĝas la individuo, sendepende de ĝia sekso kaj pezo ! Kaj estas la socio kiu, grandparte, trudas la seksajn rolojn. Aliparte, la funkciado de nia cerbo precipe dependas de nia kortekso

## NIA DOSIERO

kaj freŝdataj malkovroj montras ke la hormonoj ludas rolon, kiu ne estas tiel grava kiel oni pensis... Resume, oni devas atente uzi la diversajn donitaĵojn.

Se oni pli precize studas la homaran historion oni komprenas ke ni sukcesis supervivi ankaŭ danke al la mirinda evoluo de la virina korpo. Ja, por bone marŝi, la pelvo de la homo transformiĝis malfavore al la genero, la virino havas pli ventran gravedecon, t.e. ventro pli ronda ol tiu de la aliaj grandaj simioj kaj la sekso lokis sin kaŝita inter la femuroj. Naski infanon estas ankoraŭ pli dolora ol antaŭe. Pro tio la feto nepre adaptiĝis. La flosado de la kapostoj ebligas ŝanĝiĝon de la kapformo dum la traŭro el la patrino utero kaj tiel ĝi faciligas la naskiĝon. La gravedeco estas de 9 monatoj anstataŭ 13 por Neandertalo (estas teorio) kaj 21 por la pli malnovaj prahomoj. Tiu antaŭtempa naskiĝo, la malforto de la bebo ankaŭ helpis la socialigon de la homoj por, iumaniere, finatingi la civilizaciojn kiujn oni konas.

Ankoraŭ daŭras seksaj bataloj:

## Tutmondiĝo de la seksmerkatoj

(fragmentoj)

**La plej granda parto da analizoj de la nuntempa kapitalisma tutmondiĝo ne konsideras planedan aspekton de la sekskomerca industrio.**

Tiu ekonomia sektoro, plene kreskanta, okaziganta ege gravajn translokiĝojn da homoj, naskanta kolosajn profitojn kaj enspezojn, kunportas fundamentajn kaj neviditajn karakterizaĵojn de tiu nova stadio de kapitalisma ekonomio. Ĝia fulma kresko ankaŭ estigas prikonteston al fundamentaj homrajtoj, notinde tiuj de virinoj kaj infanoj fariĝintaj seksaj varoj (...)

De 1995, internaciaj organizoj alprenas sintenojn, kiuj (...) malgraŭ parolado denuncanta la plej malbonajn efikojn de tiu tutmondiĝo de la seksmerkato, celas la liberaligon de la prostituado kaj de la seksmerkatoj (...) Kion defen-

## La mamnutrino kaj la dommastrino.

### Aktuala divido de la taskoj.

La vorto "kondiĉo" kiel mi skribis pli supre estas tre utila por enkatenigi la homojn kaj pravigi ian hierarkion. Tiel ni parolas pri virina kondiĉo, homa aŭ animala kondiĉo sed ankoraŭ kondiĉo de la laboristo, ktp... Vi certe ja rimarkis ke ĝenerale temas pri suba kondiĉo. Oni ne povas priskribi kaj studi tiun aspekton de niaj socioj en simpla artikolo sed oni povas substreki kaj antaŭenigi la ĉefajn elementojn kiuj ebligas al ni, gesatanoj, daŭrigi seriozan pripenson kaj informi la aliajn ke iuj vortoj mensogas.

Por dividi la taskojn inter la viroj kaj la virinoj, oni ankoraŭfoje uzas pseŭdajn verojn, trovas naturajn pruvojn aŭ eĉ konfesas hipokritan zorgon pri la sano de niaj etaj inoj. Ekzemple, oni frue dungis virinojn en diversaj fabrikoj por plenumi delikatajn taskojn kiuj ne necesigas gravajn sciojn kaj estas "naturaj" ĉar tiuj taskoj similas al tiuj, kiujn honesta dommastrino faras ĉiutage (la dommastrino kiel la simpla man-

laboristino devas esti pacienca, lerta, bagatelema, ..). Tamen, oni rimarkas ke la virinoj sukcese havigis gravajn postenojn kiuj necesigas multe pli da intelektajn kompetentojn. Oni tiel povas facile renkonti kuracistinon, juristinon, inĝenierinon (2% en mia lando, Francio), bibliotekistinon, intruistinon. .. Sed tiu ŝajna sukceso kaŝas alian realecon. Tiuj profesioj ofte restas subaj, malgraŭ ĉio, kaj la salajroj ankaŭ kompare al la salajroj de la viroj kaj tio ne estas vera revolucio ĉar la virinoj ankoraŭ obeas al hierarkio diktita de la viroj. Aliparte, la virinoj devas ankaŭ zorgi la infanojn kaj akcepti en sia propra hejmo alian dividon de la taskoj altruditaj de la edzo (sufiĉas spekti la televidajn reklamojn, ekzemple). Aliparte, virinoj malofte havigas metiojn forlasitajn de viroj ĉar viroj kiuj dungas ilin kreas aliajn metiojn kaj teknikojn, "pli naturajn" por ekspluati siajn edzinojn !

Ĉar mi ne scias kiel konkludi tiun artikolon, mi lasas tiun taskon al H. de Balzac kiu skribis : "Virino estas la plej perfekta estaĵo inter la kreitoj ; ŝi estas provizora kreito inter la homo kaj la anĝelo".

*Cirilo*

de kapitalo (...)

La prostituado kaj ties konektikaj seksindustrioj : drinkejoj, dancistinklubo, bordeloj, masaĝsalonoj, entreprenoj de pornografia produktado, ktp., de kiuj profitas la koruptitaj policoj, baziĝas sur amasa subtera ekonomio kontrolata de prostituistoj ligitaj al la organizita krimo kaj profitas al koruptitaj policoj. Internaciaj hotelaj ĉenoj, aervojaĝaj entreprenoj kaj turisma industrio amplekse profitas de tiu industrio de sekskomerco. Prie eĉ registaroj profitas. (...)

Laŭ studaĵo de Bishop kaj Robinson, turisma industrio redonas 4 miliardojn da dolaroj tage al Tajlando. Prostituado fariĝis disvolviĝa strategio de ŝtatoj. Multaj ŝtatoj de Azio, Latinameriko kaj Afriko, devigitaj repagi sian ŝuldon, estis kuraĝigitaj disvolvi sian indus-

trion de turismo kaj amuziĝo far internaciaj organizoj, i. a. Internacia Monda Fonduso kaj Monda Banko.

Oni nun ĉeestas pli kaj pli gravan iniĝon de migradoj, kiuj karakterizas la kapitalisman tutmondiĝon. Granda parto de tiuj migraj fluoj iras al industriaj landoj. La eksterlandaj prostituitinoj situas sube en prostitua hierarkio, estas socie kaj kulture izolitaj kaj laboras laŭ la plej malbonaj sanaj kondiĉoj (...) La kondiĉo de virinoj kaj infanoj regresis : ekde nun, en multaj landoj de Tria Mondo, de eks-Sovetunio kaj Orienta Eŭropo frapitaj per politikoj de strukturaj alĝustigoj kaj ekonomiaj liberaligoj, virinoj kaj infanoj fariĝis krudmaterialoj (...)

La averaĝa aĝo de ekprostituado en Usono estas 14 jaroj. Rigarde tion, ĉu eblas aserti ke estas envere libera prostituado ? La pri-infaneca fako de UNO taksas ke ĉiujare unu miliono da infanoj eniras la sekskomercan industrion. (ndr. sekvas statistikoj laŭ kiuj centoj da miloj da virinoj kaj infanoj de diversaj aziaj landoj estas aĉetitaj kaj ekspluatataj). En Kanado, perantoj pagas 8.000 dolarojn por juna Azianino (...) kiun ili revendas 15.000 dolarojn al prostituisto. En okcidenta Eŭropo la kutima prezo por Eŭropanino venanta de eksaj "socialismaj" landoj estas inter 15.000 kaj 30.000 usonaj dolaroj. Enirantaj Japanion, tajlandaj virinoj ŝuldas 25.000 usonajn dolarojn.

(Sekvas raporto pri la nuntempa pornografia industrio kiu ekis kun la kreado de revuo "Playboy" kaj, de tiam, penetris ĉiujn modernajn komunikilojn. En Usono diversaj seksaj merkatoj atingas

plurajn miliardojn da dolaroj : tiu de la luado pornografiajn filmojn (ankaŭ ties ekspluatado en la hotelĉambroj, tiu de la perreta aĉetado seksan materialon aŭ tiu de la infaneca pornografio, kiu uzas infanojn apenaŭ tri jarojn aĝaj).

En 1983 oni taksis la negocosumon de pornografio je 6 miliardoj da dolaroj, kio estas notinde suba al la hodiaŭa realo, des pli ke, dum la 1990aj jaroj, tiu industrio spertis eksplodan kreskon. Pornografio estas ekde nun tutmonda industrio amase dissemita kaj totale banaligita, kiu ne nur promocias la seksan malegalecon sed aktivis favore al ties kresko.

Landoj kiuj leĝigas aŭ toleras prostituadon fariĝis gravaj turismaj lokoj (...) Naciaj Neregistaraj Organizoj (NROj) aktivis je eŭropa aŭ internacia skalo por agnoski prostituadon kiel seksan laboron. Seksa turismo, industrio kreskanta de tridek jaroj, sekvigas la prostituadon de entuta socio (...) Amasa industrio de prostituado en Sud-Orienta Azio ekis pro Vjetnama milito, sekve pro restado de militistoj en Vjetnamo, Tajlando kaj en Filipinoj (...)

Hodiaŭ oni opinias ke 18.000 prostituitinoj servas la 43.000 usonajn militistojn bazitajn en Koreio. Oni opinias ke, inter 1937 kaj 1945, la japana okupacia armeo uzis inter 100.000 kaj 200.000 koreajn prostituitinojn, kiuj estis enkarcerigitaj en "comfort stations" (rekuraĝigitaj bordeloj). Nur kelkajn tagojn post la japana malvenko, la "asocio por kreado de specialaj facilaj amuziĝoj", malrekte financata de registaro, malfermis la unuan rekuraĝigitan bordelon por usonaj sol-

datoj. Je sia kulmino, tiu asocio dungis 70.000 japanajn prostituitinojn (...)

Unua devojiĝo favore al liberaligo je tutmonda skalo de la prostitua sistemo montriĝis en 1995 dum la Konferenco de Bejing, kie unuafoje aperis la koncepto de "trudita" prostituado subkompreniganta, ke nur trudado al prostituado estis kontraŭbatalinda (...) Laŭ Marie-Victoire Louis, ĉiuj ĉi politikoj "sankcias forlason de lukto kontraŭ la prostitua sistemo kaj konfirmas pravigon de ĝia varigo (...)"

De tridek jaroj ni ĉeestas porseksigadon de la socio (...) bazitan sur socia malegaleco, kio estigas ĝin ege profitodona (...) Multnaciaj entreprenoj fariĝis aŭtonomaj ekonomiaj potencoj, kiuj havas borsan kurzon. Tiu "libertempa industrio" bazita sur sistema malobservo de homrajtoj (...), kiu povus esti antaŭe sentita kiel marĝena estas ekde nun en la centro de disvolviĝo de l' tutmonda kapitalismo. Jen kial tiu industrio, celas pli kaj pli esti agnoskita kiel banala ekonomia sektoro (...) En tiu kunteksto, rezisti aŭ lukti kontraŭ varigo de virinoj kaj infanoj fariĝas centra elemento en la lukto kontraŭ la kapitalisma tutmondiĝo. Io ajn pli modera estas kunkulpeco.

Richard Poulin (profesoro de sociologio en Universitato de Ottawa). Integrala teksto en la angla <http://cleveland.indymedia.org/news/2005/10/17474.php> en la franca : [http://sisyphe.levillage.org/article.php3?id\\_article=193](http://sisyphe.levillage.org/article.php3?id_article=193)

*Elfrancigis Djemil Kessous*

## POEMOJ

### La nokto, la silento

Mi ŝategas la nokton, la silenton, kiel ermito, kiu admiras groton kaj muzikon de la naturo. Sed mi ne havas kialon por malami la taglumon – la dunaskito de la nokto.

Kiam venas la nokto, la silento, mi trovas la longan tempon por esti vera noktogardo kun plumo en la mano por skribi el mia koro Viajn vortojn, Sinjoro.

Yohanes Manhitu

Jogjakarto, 27/11/06

### Mondo sen milito

Mi demandis min frumatene pri la senco de la vorto "paco", kiu estas tro sankta dum la milito, tre dolĉa en la vortoj, tre bona en la afiŝoj, sed jam velkas en la homa koro.

La konfliktoj iĝas fruktodone kiel la rizplantoj tre verdaj en la vasta rizkampo proksime al longa rivero sen plasto. Oni rikoltos nenion, sed militon – malamiko de la paco.

Yohanes Manhitu

Jogjakarto, 27/11/06



# SALAJRECO

NASKIĜO, VIVO KAJ MORTO DE LA SALAJRECO<sup>1</sup> :

## LA TEMPO DE LA PAŬPEROJ

**“Vi celas la mizerulojn helpitaj, mi volas la mizeron forigita”<sup>2</sup>**

De apenaŭ pli ol du jarcentoj, ni baktas en la plej granda mutacio de homara historio : la industria Revolucio<sup>3</sup>. Ĝeneralaj efikoj de tia evento, kies gravecon oni apenaŭ komencas taksi, estas hodiaŭ bone konitaj : homa loĝantaro kvinobligita en tiu mallonga daŭro (ni estas subite pli ol kvin miliardoj, dum multaj jarmiloj necesis antaŭ ol atingi la unuan miliardon) kaj ĉefe industria produktado plurcentobligita. Do, ni spertas ja veran eksplodon. Per la sekvantaj skriblinioj ni provos maldetale, resume, priskribi tiun fenomenon ; krome, ni konstato ke iuj aspektoj, kiuj ĝin stampas ĉekomence kaj ĉefine prezentas iajn similaĵojn.

Pli bone klarigi la aferon ebligas al ni mallonga komparo kun la neolitika revolucio, alia elstara fakto de la homa historio. Tiu ĉi, ja pli malnova, okazis antaŭ proksimume dek jarmiloj. Nin, ĝi trapasigis de la prahistorio al la historio, enirigis en la agrikulturan civilizacion. Sed tiu evento plenumiĝis dum pluraj jarmiloj ; sekve, ĝi estas multe pli progresiva, malakra ; krome, ĝi havis plurajn diverslokajn okazejojn (Ameriko, Mezoriento, Ekstremoriento...) Male, la nuna revolucio subite ekis fine de la 18a jarcento en ununura loko, precize limigita : la nordokcidenta parto de Anglio. En tiu eta regiono, ekde 1765, serio da inventoj kaj ennovaĵoj estigitaj de kelkaj aranĝemaj homoj kiujn agigis la nepra premo de la merkato, do de la neceseco okazigis neatenditajn sekvojn, kiuj ankoraŭ nuntempe daŭras : de la spinning-jenny de Hargreaves (maniero de ŝpinilo krude meĥanizita) ĝis la plej freŝdata note-book kun tuŝivekrano, interigis kontinua ĉeno da inventoj – vapormaŝino, fervojo, elektra energio, aŭtomobilo, nuklea industrio, elektroniko, komputiko... - kies ĝeneraligo kaj multiĝo metamorfozis la aspekton de nia tuta planedo.

Oni bone pritaksas iun revolucion, nur observante tion, kio okazas antaŭ kaj poste. Ni daŭrigu nian komparon. Antaŭ la malnova neolitika mutacio, homaro konsistas el prahistoriaj bandoj de nomadaj ĉas-plukistoj ; poste montriĝas komunumoj de fikshejmaj kamparanoj, pli poste urboj, unuaj formoj de ŝtatoj, civilizacio, historio...


Koncerne nian nunan mutacion estas malfacile antaŭvidi tion, kio okazos poste ; tamen, ni pli kaj pli bone vidas tion, kio estas antaŭe kaj dume.

Antaŭ la industria revolucio, do ĝis fino de 18a jarcento, homaron konsistigas



plejparte, 90 elcente, agrikulturaj komunumoj, kiuj vivas kvazaŭ aŭtarcie. La plej granda parto da agrikultura produktado utilas por memvivteno. Vastaj terpecoj – la komunaĵoj – kiel ties nomo montras, estas komunaj propraĵoj ekspluatitaj de ĉiuj, notinde por bredado. Kvankam servuto estas teorie aboliita, popoloj restas praktike forte ligitaj al siaj teritorioj, siaj parokoj. Mono estas rara : multaj kontribuaj kaj repagoj estas realigitaj rekte, nature. Socio estas malriĉa ; merkatekonomio kaj komerco ĝin atingas nur supraĵe tial ke, fakte, estas ja malmultaj aferoj dispartigeblaj. Finfine, kaj tio gravas por la sekvo de tiu teksto, la salajreco estas formo de ekspluatado kvazaŭ neekzistanta.

Kaj dum ? Post kelkaj jardekoj la industria revolucio jam abolas tiun si-



tuacion eksplodigante la produktivecojn de laboro kaj tero. Sed ĝi ankaŭ okazigas konsiderindan variĝon de socio. Progresive, ĉio iĝas vendebla, aĉetebla, interŝanĝebla. Unuarange, certe, tiu senlima amisiĝo da varoj priskribita de Marx komence de La Kapitalo, sed variĝo ankaŭ koncernas terojn, homan laboron – pere de salajreco – kaj entutajn sociajn sektorojn, kiuj sukcesos disvolviĝi nur pere de tiu variĝo, tiu vendebligi : distraĵojn, kulturon, sportojn, politikon, asekurojn (sociajn aŭ ne)...

Nun, ni observu iun fenomenon, kiu okazis ĉekomence de tiu tutrenverso kaj kiu, iamaniere, ŝajnas reokazi nuntempe. Necesas antaŭe noti, ke komencadoj de nia industria revolucio estas agrikulturaj. Ja notinda kresko de tera produktiveco - komencita origine en Nederlando antaŭ ol ĝeneraliĝi en Anglio – liberigas la brakojn de estonta industria rezerva armeo, kiuj poste foriros por ekigi la grandan varan produktadon. Sed tiu fenomeno ne okazas tuje, inter la hieraŭa kaj morgaŭa tagoj ; ĝi spertas ja multajn bremsojn. Dekomence, do, la brakoj de kamparanoj liberigitaj de produktiveca kresko de agrikulturo iĝos neutiligitaj ; jam ni ekvidas similaĵon kun nia nuntempeco. Nur pere de kolosa ĉenreakcio, kompleksa interago da virtaj efikoj – ekiĝo de konstanta teknika progreso, ĝeneraliĝo de la merkato, kreado de novaj bezonoj, politikaj reformoj – kapitalisma sistemo sukcesos asimili la kreskantan amason da supernombraj kamparanoj, ilin utiligante en diversaj sektoroj de industrio, unue primara, sekundara, poste, multobligante per-versajn efikojn (notinde per kreskanta burokratigo), en terciara (bankoj, asekuroj, publika funkciistaro...)

Konservativismo estas normala regulo

de funkciado de ĉiu socio ; ĉia kolektivo konsentas al ŝanĝo, krizperiode, nur trudita per neceseco. Komence de la industria revolucio, do, en tiu prekapitalisma mondo ege konservativa, gravaj fortoj kontraŭas al kreado de labormerkato, do al unu el ĉefaj kondiĉoj por la elstaro de liberalisma sistemo. En 1795 en Speenhamland, en suda Anglio, grandbienuloj decidas certigi al mizeruloj de ties distrikto ian monsubtenon, kiu konsistigas fakte realan minimuman alspezon ; la rilatan elspezon finansas biantaksoj. Speenhamland leĝo, ekde tiam, rapide ĝeneraligis tra la angla kamparo dum pluraj jardekoj ; ĝia ĉefa efiko estas ŝimigi, vivetigi en senaktiveco konsiderindan homamaso da kamparanoj senproprietigitaj de bienaj ĉirkaŭbaradoj (enclosures). Estas interese noti, ke samtempe, en 1796 en Francio, Thomas Paine prezentas antaŭ asembleo de Direktorio memuaron, kiu samcelas (eĉ pli radikale) kiel la Speenhamlanda praktiko : ĝi proponas pagon de antaŭfiksita alspezo por ĉiu plenaĝa civitano ; samkiel Anglie, financadon de rilata elspezo ebligus bienimposto.

Sed decidigaj faktoj okazas ja en Anglio. Kiel tion rimarkinde analizis Karl Polanyi (La Granda transformiĝo, 1944), nur ekde 1834, dato de abolo de la Speenhamlanda sistemo, trudante al la sociaj marĝenigoj sin vendi, salajriĝi aŭ sperti defalon en azilon, workhouse, kapitalismo sukcesas regule funkcii.

Kion ni ĉi tie intencas tezi – kaj ni certe riskas malkonfirmon de historio – estas ke ni spertas la lastajn momentojn de la industria revolucio, de tiu dujarcenta kaj monstra fenomeno, kiu tiom vundis ĉiujn vivantajn speciojn, komence de nia propra, eĉ ekstermante gravan nombron el ili. Ekde tiam, kiel ni tion sugestis ĉi-supre, oni povas konstati strangajn similaĵojn inter komenco kaj fino de tiu fenomeno. Antaŭe, ni observu iun priterminan diferencan inter malriĉeco kaj paŭpereco : dum 99% de sia ekzistado, la homo estis malriĉulo, li ne estis paŭpero ; oni pripensu la domon de malriĉaj fiŝkaptistoj de Victor Hugo : malgraŭ senhaveco, ĝi estas ordaranĝita, bontenita, bone fermita. La paŭpero estas alia homo: li estas mizerulo, defalulo, supernombrulo, hel-

pitulo... kaj tiu aparta specio multiĝas nur krizperiode, kiel antaŭ du jarcentoj aŭ nuntempe, t. e. ĉe ambaŭ ekstremoj de nia Revolucio (aŭ ankoraŭ ĉe ties kreskanta periferio<sup>4</sup>). Paŭperismo ne estas la estonto, la alvokiĝo de homaro, ĝi estas infaneca malsano, kies simptomojn socio devas suferi dum precizaj periodoj.

Do, kiel rapida kresko de produktiveco en agrikulturo, en la primara agrikultura sektoro (produktado de nutraĵoj), marĝenenpelis hieraŭ konsiderindan amason da etkamparanoj, tiel daŭra produktiveca kresko de l'sektoroj sekundara (produktado de aliaj konsumajtoj, maŝinoj kaj armiloj) kaj terciara (servoj publikaj aŭ privataj, komercaj aŭ ne) estigas hodiaŭ samajn efikojn al la idoj de tiuj iamaj senproprietigitaj kamparanoj, kiuj fariĝis nun salajruloj. Oni nuntempe observas en la suburboj de grandaj tutmondaj metropoloj, je la plej alta grado, saman fenomenon kiu ekis en angla kamparo antaŭ du jarcentoj. La problemo, kiel tion substrekas André Prime (La Grande Relève, n° 922, mai 1993), estas ke post la terciara sektoro de ekonomio, ne estas kvaternara, kiu povus ensorbi tiujn novajn viktimojn de l'produktiveco...

La similaĵon inter komenco kaj fino de la industria revolucio ni trovas ankaŭ en la diversaj aranĝoj, kiujn oni prenas kiel provojn de rimedo kontraŭ sekvoj de tiu fenomeno, kiu intertempe atingis tutplanedan dimension. Hodiaŭ, kiel dekomence, oni adoptas ie kaj tie similiajn aranĝojn kiel en Speenhamland sed je la plej internacia grado. Tiuj reformoj prezentas la jenan komunan karakterizaĵon : prefere ol kontesti la fundamenton de l' sistemo, ili celas ties konservon. Samkiel en Speenhamland, la diversaj senlaborecaj alspezoj, laŭdire por "socia inserto", senokupigas kolosan amason da defaluloj sin sentantaj senutilaj en mondo, kiu ilin forĵetas. La diferenco estas ke, antaŭ du jarcentoj la Spenhamlandaj aranĝoj kontraŭis necesan elstariĝon de l'salajreco, hodiaŭ la diversaj sociaj alspezoj kontraŭas necesan finon de salajreco.

Finfine, estas interese noti, ke dum tiu periodo multaj socialismaj skoloj ak-

tivis favore al la abolo de l' salajreco senhavante klaran konscion pri la enhavo de tiu slogano nek pri la praktikaj detaloj koncerne ĝian realigon ; al multaj el ili, tiu celo, ja pli intuicia ol precize difinita, malklariĝis dumvoje kaj finfiniĝis malaperante. Ŝajnas tamen, ke tiu malnova gvidesprimado devos nepre reveni unuarange en la aktualajoj de proksima estonteco. Pli malpli frue, laborkomerco, laborovaro devos malaperi lasante lokon al disdona ekonomio kie ĉiu rajtos universalan alspezon disdonendan denaske ĝismorte, sed ankaŭ devos (almenaŭ koncerne la kapablojn) kvitiĝi kontraŭ siaj ŝuldoj al kolektivo per socia servo templimigita. Hodiaŭ, post jarmiloj da ĝeneraligitaj mankoj, nur laboro fariĝas paradokse rara (kiel tion rimarkigis Jacques Duboin antaŭ kvindek jaroj) ; proe oni ĝin porciumu, juste dispartigu inter ĉiuj.

Jen, fakte, revenitaj tagorde tiom malnovaj idealoj de la franca Revolucio, notinde rilate civitancon, kiom tiuj de socialismo, kiuj ilin daŭrigas poste.

PS Tiu artikolo ankaŭ aperis, samtempe, en La grande Relève, malnova revuo de l' disdona ekonomio (ĝiaj unuaj numeroj datumas de 1936). Hodiaŭ mi diferece redaktus ĝian konkludon. Iame mi aniĝis en redakta skipo de tiu gazeto. Poste mi iel malproksimiĝis, ne entute konvinkiĝinte de tezoj de tiu movado rilate konsuman monon aŭ socian servon. Por pliprofundigi la problemon vd. la trian ĉapitron de mia verko La universalismo (SAT, 2002).

*Djémil KESSOUS*

[1] Artikolo publikigita en "Alternative syndicaliste", n° 7, printempo 1994.

[2] Tiujn parolojn prononcas Gauvain antaŭ sia ekzekuto, en la fino de romano de Victor Hugo Quatrevingt-treize ("Naŭdek tri", reference al terura jaro de la Franca revolucio).

[3] Kiam mi publikigis tiun tekston, tiam interesis min nur tiu flanko industria, tamen ĉefa, de la Modernepoko.

[4] Necesas ĉi tie precizigi, ke ekde sia komenco, la industria revolucio ne ĉesis krei paŭperismon, unue en ĝiaj originaj naskiĝlandoj, poste (pere de koloniismo kaj nov-koloniismo, unuaj formoj de nia nuntempa tutmondiĝo), per diserigado sociajn strukturojn de ĉiuj periferiaj socioj.



# Ŝajna objektiveco - en la servo de la dekstrularo

La falsigo de historiaj faktoj ĉiam estis unu el la precipaj propagandaj rimedoj de la dekstrularo. Oni tamen erarus konkludante el ĉi tio, ke la objektiveco siavice estas la rimedo ekskluzive propra al la maldekstrularo. Pruve de ĉi tio mi citas nur la artikolon titolitan „Budapeŝto 1956-2006” en la decembra n-ro de S-ulo, kies aŭtoro („Riŝo 11227”), kvankam penante ŝajnigi sin



maldekstrula (i.a. per la objektiva traktadmaniero de la okazintaĵoj en mia patrio en 1956), prezentas al la legantoj de S-ulo modelon pri kiel sukcese apogi kamuflite la dekstrulan propagandon.

Mia unua reago je la enhavo de la artikolo estis kelka konsterniĝo : la indikoj liveritaj en ĝi pli-malpli respondas al la faktoj (escepte eble de unu indiko, nome, de tiu pri la cifero de la viktimoj de la sovetia armeo, kiun, renkontitan de mi la unuan fojon, mi traktas kun kelka kontesto), kio en si mem estas iom surpriza, kaj ŝajnigas, ke la aŭtoro devas havi kelkan inicitecon en (aŭ personajn spertojn pri ...) la koncernaj okazintaĵoj. Kelkaj detaloj tamen ne lasis min resti indiferenta. Jen ili.

La uzado de la esprimo „liberaj diskutoj” (kiu tute harmonias kun la parencaj esprimoj „libera mondo”, „libera Eŭropo” k.s.), simile vaste uzitaj de la burĝa propagando okcidenta, precipe tempe de la malvarma milito) sugestas la supozon, kvazaŭ la libera diskutado (alm. principe) estus fremda al la politika vivo publika en socialismaj landoj. Ne volante nei la kazojn de malobservo de ĉi tiu principo, mi mencias, ke en la koncernaj jaroj la mondon serioze mi-

nacis la danĝero de nova mondmilito (inter la „mondoj” socialisma kaj kapitalisma), kio iom limigis ankaŭ Okcidente la liberecon de parolo, ĉar cetero la libero paroli atingas (kaj ankaŭ efektive atingis) ĝuste en socialismaj cirkonstancoj sian evolupinton. Mi apenaŭ eraras supozante, ke la aŭtoro, uzante la esprimon (kaj tiun de „liberaj elektoj” k.s.), volas pledi por politika plurismo, kiu, kvankam ne prezentanta antagonisman kontraŭecon al la socialisma sociordo, en tiuj cirkonstancoj (en Hungario) estis ne realigebla (parte pro la renegateco kaj senprincipa cedemo de „komunisto”-ĉefministro I. Nagy).

La aŭtoro, skribante pri „interveno per armiloj” per la „ŝtata sekureca polico” (temas pri „AVO”, kiu simbolas la nomon „Ŝtatdefenda taĉmento”), esence eraras. Li tre veŝajne pensis pri la grava provoko farita de kontraŭ-revolucioj je la 25-a de oktobro 1956 ĉe la Hungaria Parlamentejo (kie tiuj masakris pli ol 100 senkulpajn homojn) por krei pretekston por la posta amasa persekutado kaj ekzekutado de AVO-anoj kaj komunistoj.

Tio fakte, ke estis ankaŭ simpatiantoj kaj en la armeo kaj en la polico, sed fakte ankaŭ, ke simplaj policanoj, soldatoj, kvankam pleje pretaj armile subpremi la ribelon (kontraŭ la popola potenco), estis kadukigitaj pro la perfido de siaj superuloj (kies manojn, siavice, ligis la perfido ĉe la plej altaj komandoj policaj kaj armeaj). Kontraŭstaro tamen okazis, kvankam I. Nagy kategorie malpermesis radikale elpaŝi per armitaj fortoj.

Okcidento, penante vekti simpatian por la „martiroj” de la „revolucio” (I. Nagy k.s.), kreas ne tiom por la koncernaj homoj nimbon, kiom por la „partizanoj” de la provo senigi la laborantan popolon je ĝia tiama potenco. Ekz. tion oni pleje eĉ ne scias, ke I. Nagy, kiel agento de la sovetaj ŝtatsekurecaj fortoj, denunciis pli ol centon da hungaraj komunistoj, el kiuj pli ol 10 estis ekzekutitaj en So-

vetunio. Sed la nunajn kreintojn de la Nagy-kulto ĉi tiu „bagatelo” ne ĝenas, nek la „komunisteco” de Nagy ...

La aŭtoro, estunte kapabla dialektike taksu (kaj komenti) la koncernajn okazintaĵojn, ne parolus pri „mi-



zera stato ekonomia” en tiuj jaroj, nek pri „revolucio”. Tio veras, ke la vivkondiĉoj tiam estis ne paradizaj, sed nomi ilin mizeraj estas troigo. Li pri-silentas, ke la hungara popolo atingis jam 4 jarojn post la terura milito la vivnivelon en 1938 (poste eĉ superis ĝin), eĉ se en la periodo inter 1951-53 ankaŭ okazis refalo en la rekta evoluo (parte pro mistraĵoj en la planado de la nacia ekonomio).

La aŭtoro, nomante la tiamajn eventojn „revolucio”, pruvas, ke li remadas en la sama boato kun la burĝaj demagogoj. Ĉu li ja ne scius, ke rezulte de revolucioj ĉiam okazas antaŭeniĝo en la socia evoluo, dum tio, kio okazis tiam en Hungario, estus rezultiginta la restaŭradon de kapitalismo, do efektive nomeblas kontraŭ-revolucio ?

Troigo nomeblas ankaŭ la vorto „popolleviĝo”, se kvalifiki la eventojn en '56, ĉar en la okazintaĵoj partoprenis nur malgranda ono de la hungara popolo. Ankaŭ la parto de la partoprenintaj laboristoj prezentis malgrandan onon de tiu socia klaso, kaj varbiĝis unuavice el laboristoj kun nebula aŭ reakcia mondkoncepto. Samtiel, kiel la burĝa propagando, ankaŭ „Riŝo” silentas pri tio, ke grandan parton de la „liberebatalantoj” konsistigis krimuloj laŭ la publika aŭ politika juroj, da kiuj la „revolucionoj” liberigis pli ol 13 mil el la prizonoj dum la entemaj okazintaĵoj. Li silentas ankaŭ pri tiuj 2000 armitoj,

kiuj, ĝustatempe preparitaj kaj enbataligitaj, obeis al la ordonoj de NATO-oficiroj kaŝiĝintaj en sekretaj kaŝejoj en la ĉefurba fortreso. „Riŝo” ne fanfaronas ankaŭ pri la linĉado de 23 el la 25 defendantoj de la ĉefurba sidejo partia, okazinta la 30-an de oktobro, nek pri tio, ke ĝis la 4-a de novembro

oni tutlande kompilis listojn el proks. 10 mil komunistoj, kies ekzekutado estus tuj komenciĝinta, se la soveta armeo estus ne estinginta la fajron de la nova blanka teroro.

Kaj fine, por „ilustri” la „severan subpremon” en la postaj jaroj, jen fotojaĵo

pri la amasega manifestacio de laboruloj bonveniganta la vojon al socialismo okaze de la festo de la 1-a de majo en 1957. Kara Riŝo, ĉu la anoj de la popoloj kutimas manpremi kun siaj „severaj subpremantoj” ?

J. Petik

## Mia opinio pri la aktuala financa situacio de SAT

1) La afero “Kreŝo” estas nura konsekvenco de la jam delonge antaŭvidita nuna financa situacio de SAT pro la malkresko de la membraro, kaj pri ĝi mi jam aŭdis ekde mia unua kongreso en Alikanto. Reagoj de la membroj ? Neniu, ĝis alvenis momento trovi kulpulon por demeti el si la respondecon. Kompreneble, finance la subteno al Kreŝo estas preskaŭ neeltenebla, sed, pardonu min, MORALE, por ni, estas ne preskaŭ, sed tute neeltenebla maldungo de Kreŝo. Estas amuze, ke oni kritikis la speguligon en la listo de SAT de la “burĝaj” aferoj rilate Radion Pollando kaj la benon de la Papo, tiuj kritikis la pardonon de la valoroj de SAT, la neplenumadon de servoj al la kamaradoj, kiuj ne havas retaliron... kaj tiuj samaj postulas fari tion, kontraŭ kio batalas kaj devas batali ĉiu laboristo : malobservo de la rajtoj de la laboristoj ! Miaopinie, se SAT maldungus Kreŝon, SAT perdus sian tutan ekzistokialon.

2) Foje kelkaj homoj supozas, ke SAT devas estis tute tia, kiel ili supozas ke devas esti, ke SAT devas havi ilian ĝustan kaj ununuran opinionon, kaj agi ĝuste, kiel ili supozas. Kaj konsideras eraraj tiajn opiniojn, kiuj ne kongruas kun la propraj. Tiaj homoj fakte neniel

povas partopreni ian ajn kolektivan organizon, ĉar ne konsentas ke homoj, eĉ havantaj proksimajn vidpunktojn, estas ja diversaj. Ili nun povas esti en organizoj, kies ununuraj membroj estas ili mem. Mi mem, apartenanta al maldekstra minoritato kadre de SAT, kies ideoj foje estas forte malŝatataj far aliaj kamaradoj, fieras pri la diverseco de SAT, kaj fieras pri tio, ke la etoso inter diversaj pensmanieroj pliboniĝas pli kaj pli.

3) Estas kutimo, ne nur en SAT, sed en ĉiuj esperantaj organizoj kritiki la estraron pri ĉiuj problemoj, kiuj povas okazi en la organizo. Tion mi komprenus, se temus pri forta ŝtata instituto, aŭ pri privata entrepreno, aŭ pri riĉa organizo, laŭ kies statuto la membraroj delegas al la estraro la tutan funkciadon kaj respondecon pri la funkciado de la organizo, kaj la membroj de la estraro, anstataŭ dediĉi al tio nur la disponeblan liberan tempon, ricevus salajron de la organizo. Sed karaj, tute ne estas tiel : la funkciado de **SAT ESTAS RESPONDECO DE ĈIUJ EL NI, NE DE LA PLENUMKOMITATO**. Plejmulto de la SAT-anoj agas, kvazaŭ pago de kotizo estus nura abono al Sennaciulo, kaj tiu rajtigus kritiki la

PK farante mem nenion...

4)... kaj forgesante, ke la nuna problemo de SAT tute ne rilatas Kreŝon, nek la PK, sed la mizeran neagadon de la membraro mem. Neaperigo de la Adresaro, aŭ neeldonado de libroj, NPV, aŭ maloftigado de Sennaciulo ne estas rimedo kontraŭ la nuna financa situacio, sed **\_ĜIA KONSEKVENCO\_** !!!! La vera reala problemo, kies rezulto estas la financa situacio, estas la malkresko de la membraro, kaj la sola respondeculo estas **\_ĈIU MEMBRO MEM\_**. Sufiĉas kalkuli, kia estus la financa situacio, se dum la lasta jaro ĉiu kamarado estus alloginta novan kamaradon al SAT. Nenia financa problemo ekzistis, nek ĝiaj konsekvencoj. Do, mi petas, karaj kritikemaj kaj lumigitaj gekamaradoj, rigardu vin en la spegulo kaj demandu vin : kion mi mem faris por SAT ? Kiom da novaj membroj mi allogis al SAT dum la lasta jaro ?? Kaj, se vi allogis nek unu membron dum la lasta jaro, bonvolu ŝtopi vian buŝegon. Kaj agu, se por vi vere gravas la estonteco de SAT.

Kamaradece,  
Pedro HERNANDES

## Kiel tuj ekagi por SAT?

Dum la pasinta jaro, la poresperanta fako de SAT pretigis pli detalajn prezentojn de nia asocio kaj de Esperanto (el laborista vidpunkto) por la retpaĝoj de SAT, por provizi nekonatojn, kiuj alvenas al nia retejo, per sufiĉe detalaj bazaj informoj. Ĝis nun tiuj tekstoj haveblas nur en la jenaj lingvoj: de, en, fr, hr, it (parte), nl en preparo). Do se vi

scipovas alian lingvon ol tiuj menciitaj, via traduko povos helpi al pli efika varbado por SAT. La tradukeblaj tekstoj troviĝas ĉe la jenaj adresoj:  
<http://www.satesperanto.org-Kio-estas-SAT.html> kaj  
<http://www.satesperanto.org/Espananto-Kio-estas-tio.html>.  
Ankaŭ komentoj pri la strategia utilo

de la enhavo estas bonvenaj. Komparo pri varbstrategioj ja estas unu el la celoj de la PF.

[vinkomarkov@yahoo.fr](mailto:vinkomarkov@yahoo.fr)

Eblas aliĝi al la reta dissendolisto de la PF, ĉu rekte ĉe :  
<http://groups.yahoo.com/group/SAT-poresperanta-fako/>, ĉu petante aliĝon de la prizorganto, [gmickle@negxo.de](mailto:gmicke@negxo.de).



# Kotizoj 2007

Lando	valuto	kotizo + abono
Argentino	€	27
Aŭstralio	€	52
Aŭstrio	€	52
Belgio	€	52
Bosnio-Hercegovino	€	8
Brazilio	€	22
Britio	GBP	35
Bulgario	€	12
Ĉeĥio	€	20
Ĉinio	CNY	45
Danio	€	52
Estonio	€	10
Finnlando	€	52
Francio	€	52
Germanio	€	52
Hispanio	€	40
Hungario	€	12
Italio	€	50
Israelio	€	32
Japanio	JPY	8400
Kanado	CAD	79
Koreio	€	33
Kroatio	€	12
Latvio	€	10
Litovio	€	10
Malagasio	€	3
Nederlando	€	52
Norvegio	€	52
Pollando	€	12
Portugalia	€	30
Rusio	€	10
Serbio	€	10
Slovakio	€	12
Slovenio	€	12
Svedio	€	52
Svisio	CHF	90
Ukrainio	€	10
Usono	USD	70
<b>Dumviva memreco</b>	€	<b>1300</b>
Aliaj nemencitaj landoj		
Eŭropo	€	33
Cetero de la mondo	€	20
<b>Abono por nemembroj</b>	€	<b>57</b>

## LANDAJ PERANTOJ

**Argentino** : Rodolfo Calogero, Calle Luna de Cuarzo 478, bario Salud Publica, AR- 8300 Neuquen.

**Aŭstralio**: Bernie Heinze, 1 Marne Rd., Mount Evelyn, Vict.-3796. Reto: <franciska@bigpond.com>

**Aŭstrio** : Vakas

**Belgio** : Jacques (Jakvo) Schram, 49 Hoffer Bekestraat, BE-2018 Antwerpen. Reto: jakvo <jakvo@mac.com> . Poŝtkonto: 000-1692025-54

**Bosnio-Hercegovino** : Ivica Horvat, Žrtava faŝizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo. rete: <civicah@lsinter.net>

**Brazilio** : José Joaquin Lunazzi, rua Manoel Antunes Novo 668, BR-13084-157 Campinas-SP. Rete: <lunazzi@uol.com.br>

**Britio** : Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex, CM13-1EJ (Tel.:+44.1.277.22.89.62) Rete: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

**Bulgario** : Ivanka Stojanova, P.O.Box 701, BG-9000 Varna. Rete: <ivanka\_esperanto@abv.bg>

**Ĉeĥio** : Vaclav Stiburek, J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, rete: <stiburek.v@seznam.cz>

**Ĉinio** : Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Jian-Gong-Lu 8 hao, CN-710043 Xi'an. Tel:0086-29-2242215, fakso: 2622952, Rete: <esp@pub.

xaonline.com>

**Danio** : Ulrik Rasmussen, Nørregårdsvej 66, DK-2610 Rødovre.

**Estonio** : Freed Neeme, Kooli 6-26, EE-2240 Kehra.

**Finnlando** : Vakas

**Francio** : Pierre Quillaud, 16 rue du Lt.-Vaisseau Paris, FR-76120 Le Grand Quevilly, pĉk.-SAT Peranto n° 17 333 10 N, Paris. Reto:<quillaud.p.mt@wanadoo.fr>

**Germanio** : Jiri Proškovec, Heimbau Str. 10, DE-44143 Dortmund, Konto ĉe NetBank, PLZ:200 905 00, Kto N°82 79 292. Reto: <proskovec@yahoo.de>

**Hispanio** : Pedro Sanz Sanz, C/Mar de Fora 13, esc. izq.,3-B, ES-28400 Collado Villalba. Konto: 0227-0001-85 0200526929 elektronika banko BBVA.

Reto:<pmariass1@mi.madritel.es>

**Hungario** : Béla Kovacs, Béla kiraly u.-44, HU-7400 Kaposvar. Ĝirkonto 11773432-04632175. rete: <espbela@axelero.hu>

**Italio** : Carlo Bourlot, Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) Tel: 011-3970477 (vesp. ĝis 23h), Poŝtbanka konto n° 43976158. rete:<c.bourlot@libero.it >

**Izraelio** : Jehoŝua Tilleman, 97-A, Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin.

**Japanio** : Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si.-Pĉk.-00980-9-37624, SAT-Nihon. Reto: <nhryk@pop07.odn.ne.jp>

**Kanado** : Hans E. Ilginnis, 810 Dunsmuir Cr. Ladysmith, B.C. V9G 1N7, Kanado, bankkonto: Sennacieca Asocio Tutmonda CIBC, transit 540, Account n° 0747831; Rete: <hans@nanaimo.ark.com>

**Koreio**: Choi Manwon, P.O.Box 18, Guang-Ju, KR-501-012 Seoul

**Kroatio** : Zdenka Svetličić, Matoševa 6, HR-10410 Velika Gorica, reto: <sat\_hr@yahoo.com>

**Latvio** : Margarita Zelve, Rupniecibas 35+13, LV-1045 Riga-45

**Litovio** : Gražina Opulskiene, Tylioji 32-22, LT-5503 Mažeikiai, rete:<grazopul@yahoo.com>

**Malagasio** : Justine (Lala) Ralalarisoa, Lot IIC-72-FD Manjakaray, MG-101 Antananarivo. Bankkonto: Ralalarisoa Justine, n° 010594738020000 BNI-CL 101 Antananarivo.

**Nederlando** : Corrie Kwantes-Kooij, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, pĉk. 2853752.

**Norvegio** : Per Engen, Østregate 14, H0203, NO-2317 Hamar.

**Pollando** : Elzbieta Janusz, ul.-Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow, Bankkonto : BPH III O/Krakow 71 1060 0076 0000 3000 0177 7438

**Portugalia** : Manuel Luis Pedrosa Alves, Estrada Principal n° 79, PT-2710 -413 Morelino-Sintra. Rete: <ml.pedrosa@netcabo.pt>

**Rusio** : Nikolao Gudskov, a/k 57, RU-105318 Moskvo, Reto: <nikolao@orc.ru>

**Serbio** : Ivan Močilnik, Požeška 132, SCG-11030 Beograd.

**Slovakio** : Miro Zavodsky, Juraja Zavodskeho 67, SK-01004 Zilina-Zavodie.

**Slovenio** : Vakas

**Svedio** : Inga Johanson, Stampgatan 60.B.-127, SE-411 01 Göteborg, pĉk.-SAT c/o I.-Johanson, n°-26-63-22-7. Rete: <sat\_sverige@yahoo.se>

**Svisio** : Richard Schneller, Höhenstrasse 1 b CH-9302 Kronbühl, poŝtkonto: 25-158577-1, Rete:<rischneller@gmail.com>

**Ukrainio** : Dmitrij M.-Cibulevskij, a/k 10939, UA-61003 Ĥarkiv-3

**Usono** : Vakas

Krom al la perantoj oni povas pagi al: Poŝtkonto de SAT: n° 1234-22 K. Paris. Internacie:

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39 BIC: PSSFRPPPAR

aŭ al la konto de SAT ĉe UEA: **satx-s**

## El la SAT-sidejo

### DUMVIVAJ MEMBROJ DE SAT

Sekve de nia invito en aŭgust-septembra numero de Sennaciulo, jenaj gekamaradoj iĝis dum-vivaj membroj de nia Asocio :

32785 François DEGOUL  
34507 Franciska TOUBALE  
35501 J.M. SALGUERO (Kani)  
35584 Carmen CIDONCHA  
32319 Pierre GROLLEMUND  
35793 Stephane HERVE  
33475 Lorenzo NOGUERA SARASA  
24707 Gisèle MICHAUD  
33402 Jean Jacques HIBLOT  
32805 Roger HARDY  
35425 Carlo BOURLOT  
32839 Louis ENSUQUE  
35318 Jean Claude ROGER  
32808 Rodolfo G. CALOGERO  
31753 Nobuyuki SYOOZI  
34554 Pedro SANZ SANZ  
32.344 Guy VANDERPUTTEN  
32639 Christiane LURKINE

### POR ŜTOPI LA BREĈON

T. Sabathier 100,00 €; Abe K. 3200 ¥; Fukumoto H. 1600 ¥; Hanazawa M. 400 ¥; Hayasu K. 1600 ¥; Hirayama T. 600 ¥; Hori Y. 1600 ¥; Huzimaki K. 1600 ¥; Kawanisi T. 11600 ¥; Kobayasi U. 1600 ¥; Kurisu K.: 10000 ¥; Makino T. 4400 ¥; Matuoka K. 1600 ¥; Morita A. 1600 ¥; Oikaŭa J. 400 ¥; Okuda H. 1600 ¥; Oogusi S. 1600 ¥; Tanaka 100 ¥; Tezuka T. ¥; Tojo J. 1600 ¥; Toyama K. ¥; Unoki T. 1600 ¥; anonime 125,00 €; anonime 50,00 €; P. Dehan 18,00 €; R. Bouchet 6,00 €; J. Cagnard 23,00 €; Fam. Sadier 12,00 €; SAT-Amikaro 183,00 €; LJO 50,00 €; Haberland 8,00 €; haupt 8,00 €; Ehlers 13,00 €; Bolter 8,00 €; Mickle 8,00 €; Bues 48,00 €; C.A.Carleos Artime 4,00 €

### NEKROLOGO

Laŭ la poŝta informo, ĵus forpasis en Derby (GB), nia malnova membro, kamarado

**E.J. WHEATLEY**  
(matr. 22684)

Ni kondolencas al lia familio kaj geamikoj.



SAT-Kongreso 2007

Parizo, 21-28.07.2007

## BAZAJ PRAKTIKAJ INFORMOJ

### Loko kaj dato

La 80-a kongreso de SAT okazos inter la 21-a kaj la 28-a de julio 2007, je 12 kilometroj sude de Parizo, ambaŭflanke de la limo inter la najbaraj urboj Ĉatenezo-Malabrio (*Châtenay-Malabry*) kaj Antonio (*Antony*).

La elektita kongrestemo estos **Internacia solidareco**. Al ĝi estos dediĉitaj pluraj prelegoj kaj debatoj, enkondukitaj de kamaradoj el diversaj mondopartoj.

### Ĉefa kontakt-adreso :

- ▶ paperpoŝte : Ansofi Markov, 61 bd. Vauban, FR-78180 Montigny-le-Bretonneux, Francio
- ▶ rete: vinkomarkov ĉe yahoo punkto fr

**OKK** : Bob Cordeau, Michelle Cordeau, Agnès Luc, Ansofi Markov, Vinko Markov, Joël Martin-Gallausiaux

Kongreskotizoj en €	ĝis 28.02.07	ĝis 30.04.07	ĝis 30.06.07	pli poste
SAT-membro	55	65	75	85
SAT-geedzoj (se ambaŭ)	80	95	110	125
SAT-junul(in)o ĝis 25	25	30	35	40
Nemembro de SAT	70	80	90	100
Junula nemembro de SAT	35	40	45	50

- ▶ Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon.
- ▶ La partoprenantoj el CZ, EE, HU, LT, LV, PL kaj SK ĝuas 30 % rabaton.
- ▶ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI), kaj eksa SU (krom EE, LT kaj LV) kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.
- ▶ Kongresaneco ne transdoneblas al alia persono. La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron.
- ▶ La kotizo ne estas repagebla senkonsidere pro kia kaŭzo la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson.
- ▶ Aliĝilon sen pago de kotizo la OKK ne traktos.

### Pageblecoj

- ▶ En Francio : Poŝtkonto : SAT-junulfako n°38 319 09 J 033
- ▶ El eksterlando - sama konto : IBAN : FR60 2004 1010 1238 3190 9J03 356  
BIC : PSSTFRPPSCE aŭ al SAT-konto ĉe UEA : satx-s

Aliĝilo troviĝas kun tiu ĉi numero de Sennaciulo aŭ estas elŝutebla en la adreso:  
<http://www.satesperanto.org/Unuaj-praktikaj-informoj.html>

**ATENTU : Tiuj, kiuj bezonas enirvizon al Francio tion devas indiki ĝis la 30-a de Aprilo 2007 aldonante la pasportnumeron sur la aliĝilo. Al nealiĝantoj OKK ne sendas invitleteron.**

Matenmanĝo kostos 4 €, tagmanĝo 7,50 € kaj vespermanĝo ankaŭ 7,50 €.





## La obskuraj kuirejoj

Se vi ne kapablas iomete sorĉi, ne estas peninde entrudiĝi en kuirarton.

Colette

La sorĉistino estas grava personaĵo de la okcidenta kaj orienta historioj. Ankoraŭ nun, ŝi okupas fundamentan lokon en nia imago kaj niaj pli-malpli vivantaj folkloroj. Infane, ni ofte kredigis al niaj geamikoj ke iu najbarino estas malica sorĉistino kiu boligas malafablajn geknabojn en sia kaldrono. En iuj karnavaloj oni ŝatas ŝminki sin tielmaniere ke ni similas al demonaj personaĵoj kiuj frekventas groteskan nigran meson kie, pelmele, pasas sorĉistinoj, monstroj, mumioj, vampiroj, Napoleonoj, piratoj, klo-noj de Elvis Presley, feinoj, bestoj ...ĉar ĉiufoje oni adoras ridindigi la personaĵojn kiuj hantas nin. Sed estas alia historio kiun mi tuj rakontos. En tiu ĉi historio la sorĉistinoj ne estas ridindaj personaĵoj sed kompatindaj viktimoj de la mizero, la obskurantismo kaj la frenezeco de la viroj. Ja, en Eŭropo, de la 15-a al la 18-a jarcento nenombreblaj virinoj mortis sekve de nenomeblaj, kruele kaj torturoj kaj diversaj brutalaĵoj aŭ sur la bruleŝafodoj de la Sankta Inkvizicio. Tio, kion oni nomas "la ĉasado kontraŭ la sorĉistinoj" estas, verdire, horora krimo, genocido kontraŭ, plej ofte, la malriĉaj, malsanaj virinoj kiu respondas al kompleksa historia, ideologia kunteksto kaj malnovaj simboloj.

### La malriĉulinoj

Strange, la ĉasado kaj la perfortoj kontraŭ la sorĉistinoj kulminas dum la Renesanco kaj daŭras ĝis la 18- a jarcento (entute 100 000 viktimoj) kiam aperas la humanista filozofio kaj la kartezianismo, la modernaj sciencoj, la koncepto de la progreso,... Sed ĉiufoje kiam oni pli atente rigardas la historion oni rimarkas ke la perforto kontraŭ iuj virinoj intensiĝas kiam la mizero, militoj, epidemioj pereigas la sociojn kaj endanĝerigas jam malfortan ŝtaton. Subite, por forturni la plagojn oni tuj trovas kulpulinojn, oferas povrulin-ojn. Estas tre facila tasko. Malriĉaj, solaj, malfortaj, kriplaj virinoj, vidvinoj, cigani-noj, paganinoj sed ankaŭ la ŝafpaŝtistinoj aŭ akuŝistinoj estas la ĉefaj viktimoj de



la Inkvizicio kaj denuncitaj de ĵaluzaj aŭ timigitaj najbaroj. La pli altaj sociaj tavoloj ne estis preterlasitaj. Oni timas la ŝafpaŝtistinon ĉar ŝi vivas en la naturo kun bestoj kaj la akuŝistinon ĉar ŝi ofte vivas sole, konas la sekretojn de la plantoj kaj sekrete kontaktas la virinojn de la vilaĝo! Oni akuzas ilin esti kaŭzo de sterileco, samseksemaj orgioj, malsanoj, morto, malbonaj rikoltoj, herezioj kaj blasfemoj. Verdire, tiaj akuzoj ankaŭ kaŝas tre realan sed strangan timegon: Oni timas la seksecon de la virino kaj ŝian eroton. Certe ja, ekzistis sorĉistinoj kiuj dank' al marko sur la haŭto malagnoskas la kristanismon kaj la socion kiu obeas al la oficiala moralo. Ili, laŭdire, renkontiĝis dum sekretaj sorĉkunvenoj kie ili preĝis al Satano, oferis bestojn, bebojn, seksumis kaj preparis venenojn kaj ĉi tiuj malbenaj kunvenoj naskis potencajn fantasmojn, kiujn antikvaj simboloj plikonkretigas. Jes, dum la sorĉkunvenoj la satanistinoj spitas la statuton de la virinoj en la eŭropa kristana civilizacio. Estas nepardonebla peko.

### La melankolia fajro

Kiel mi skribis pli supre, la reprezentado de la sorĉistino en la okcidenta Eŭropo obeas al malnovaj kaj precizaj simboloj. La plej komuna el tiuj simboloj estas LA FAJRO. Ja, la sorĉistino estas, iumaniere, malvirta dommastrino kiu perversigas la familion, la socion, la moralon. Kiel

la virta edzino kiu kuiras por nutri siajn geinfanojn, la sorĉistino bezonas fajron por prepari sorĉojn kaj dekoktaĵojn. Sed la fajro de la sorĉistino estas satana fajro kiu varmigas kaldronojn kaj potojn plenajn de venenoj. La fajro de la sorĉistinoj ankaŭ estas flamo de la kandeloj kiuj lumigas la noktajn sorĉkunvenojn, la haŭtmalsanoj kiuj terure jukas, la fulmo meze de la nokto kaj la interna fajro de la seksa deziro kiu konsumas korpon kaj animon. La ekvacio estas simpla : Sorĉistino= Fia Virino= Detruema Eroto. En la kristana moralo la emo al la sekso estas peko (la kulto de la Virgino aperis dum la 11-a jarcento), la seksa deziro estas do satana fajro, obskura kaj sterila kiel la cindro kiun oni uzas por fabriki la sorĉojn. La cindro estas kaŝita fajro. Eĉ la voĉo de la sorĉistinoj, laŭ la legendoj, bruligas. La sorĉistina fajro ellasas fu-



mon kiu obskurigas la socion. Finfine, la satana fajro kontraŭas la bapton akvon. La sorĉkunvenoj estus la subfosa festo de la malobeo kie okazas nenomeblaj krimoj kontraŭ la gentoj, la infanoj, la fertileco de la virinoj, la fruktodonaj kampoj. Eĉ la kuirarto de la sorĉistinoj putrigas ĉion ĉar ĝi konsistas el fetoraj kaĉoj tro kuiritaj...

Laŭ la Eklezio la sorĉistino estas melankolia virino kies sango estas poluita de nigra humoro, unu viktimo de la Diabolo kiu vivas en la fantasma kaj la iluzio. Kaj por lukti kontraŭ tia infekto oni inventis ekzekuton konforman al la krimo : la bruleŝafodo !

### Enĉenigi Lilith

Paralele al la sorĉistina kuirejoj ekzistas do inkviziciaj kuirejoj kie la Eklezio preparas la fiajn receptojn de la subpremo kiu celas simple nei la korpan plezuron de la virinoj kaj malebligi la egalecon kun la viroj. Kiel la sorĉistino kiu boligas la

venenojn, la sankta inkvizicio boligas la korpon de fiulinoj, senkulpulinoj, mal-sanulinoj, frenezulinoj,... Kompreneble ankaŭ ekzistis multaj aliaj turmentoj kaj ĉiu torturo celas ankoraŭ redukti la korpojn, la dezirojn, la volojn, la liberecon (oni razis al ili la kapon kaj la pubon antaŭ torturi ilin ĉar oni kredis ke Satano kaŝis sin inter la haroj). Sed kion reale timegas la Eklezio ?

La sorĉkunveno estas herezio kiu foje plenumas tre precizajn ritojn kaj enradikiĝas en tre malnovaj mitoj. Ja, laŭ iuj judaj tradicioj la vera edzino de Adamo estus Lilith kiu naskiĝis de lia karno mem. Ŝi do estus egala al li. Ili havas saman esencon. Tamen, Lilith estas la arketipo de la delogantino kaj posedis nekontentigeblan seksan deziron, la absoluta vampiro, unuvorte, la perfekta malo de Eva. Pli poste, ŝi kunfandiĝos kun la ĉefaj patrinaj diinoj de la antikveco kiel Lamashtu aŭ Isis. Ŝaktio de Lucifero ŝi simbolas la ribelantan virinon kiu malmegas la instituciojn, la familion, la paron, ne deziras infanojn, unuvorte, kiel Lilith, la sorĉistino spitas la familion, t.e.



la unua ĉenero de la socio, la ŝtato do. La veraj sorĉistinoj certe kredis je tiuj mitoj kiuj substrekis ŝian resenton. En tiuj epokoj ekzistis multaj herezioj kiuj pli malpli minacis la stabilecon de la politika kaj religia Eŭropo, kiun militoj jam malfortigis, por restarigi la regpotencon de la princoj kaj ordonpovon de la Eklezio la virinoj estis perfektaj krimulinoj.

Kurioze, kaj mi tie konkludas mian artikolon, la pli kaj pli rapida progreso de la presarto estis efika ilo por la ĉasado kontraŭ la sorĉistinoj. La plej fama libro kiu pritraktas la temon, la "Martelo de la sorĉistinoj" (Malleus maleficarum), estas eldonata en 1480 kaj verkita de dominikano, Heinrich Kramer, kiu ne kaŝis tre strangan, teruran malamon al la virinoj. Aliaj libroj estos eldonataj inter 1580 kaj 1670. La populara literaturo, la famaj "bluaj libretoj", ankaŭ ekspluato la temon kaj efike disvastigos la neracian timon de la sorĉistinoj. Tiele, ilo de klerco, la libro povas esti ilo de fanatika malamo.

Cirilo

## Unu bildo, unu artisto

### Niki de Saint Phalle, la artistino kiu reinventis la virinon

Niki de Saint Phalle naskiĝis en Francio la 29-an de oktobro 1930 kaj el-



*Niki de Saint Phalle*

migris al Usono kun sia familio. Tre perturbita de sia incesta patro, ŝi ta-

men fariĝas manekenino por "Vogue", "Life" kaj "Elle". Ŝi komencas artan karieron dank'al la subteno de Hugh Weiss kaj partoprenas al la movado de la "novaj realistoj" inter Francio kaj Usono. Famega pro siaj buntaj skulptaĵoj, kiujn ŝi nomis "Nana-oj". Niki de Saint Phalle estas unu el la plej mondfamaj artistinoj. Ŝi komencas la desegnon en la 50-aj jaroj kaj miksas politikon kaj arton komence de la 60-aj jaroj. Jam en ĉi tiu periodo la arto de la artistino baziĝas sur teknikoj de kunmetaĵoj, gluaĵoj, transformado de materialoj. Niki de Saint Phalle ekspluatis plurajn scikampojn : la arton do sed ankaŭ la gazetaron kaj la amaskomunikilojn. Antaŭ la apero de la feminismo en la arto, ŝi depostulas sian virinecon kaj eĉ se ŝia propra beleco helpus artistinon, Niki de Saint Phalle antaŭenigis novajn aspektojn kaj rolojn de la inoj en la socio. Dank'al sia arto, Niki de Saint Phalle malkovris vervegan, energian, gajan virinon kaj forbalais la malnovajn stereotipojn.

Aktivulino de la asocio AIDS kaj grava observantino de sia epoko, Niki de Saint Phalle mortis en San Diego la 21-an de majo 2002 pro la venenaj vaporoj de la materialoj kiujn ŝi uzis por krei siajn skulptaĵojn.



Niki de Saint Phalle Copyright © www. Biosstars.com

*Ŝia buntkolora skulptaĵo*

Cirilo